

Joseph Mohr,
Paca nokt'

tradukita de Joachim Gießner

Paca nokt', sankta hor',
malkviet' foras for.
Nur maldormas la sankta
par',
knabo eta kun bukla harar'
dormu en ĉiela trankvil',
dormu en ĉiela trankvil'!

Paca nokt', sankta hor',
paŝtistar' en ador'.
Tra l'angela haleluja
al la mond' sonegas ja:
venis Krist', la Savant',
venis Krist', la Savant'.

Paca nokt', sankta hor',
dia fil', via kor'
donas amon dian sen fin',
de malbon' vi savis ja nin,
Krist', per via naskiĝ',
Krist', per via naskiĝ'.

...

Joseph Mohr,
Kristnaska kanto

tradukita de N. N. 04

1. Paca nokt', sankta nokt'!
Mutas nun eĉ la vent'.
Jen maldormas nur amplena
par';
ĉarma knabo kun bukla harar'.
Dormu plu en silent'!
Dormu plu en silent'!

2. Paca nokt', sankta nokt'!
Tra l' aer' vibras kant'.
Al paŝtistoj proklamas anĝel':
Li kondukos vin al la ĉiel',
Li, de l' mondo Savant',
Li, de l' mondo Savant'.

3. Paca nokt', sankta nokt'!
En la mond' Fil' de Di'!
Am' radias al ni el ĉi kor'.
Por elsavo nun sonas la hor':
Krist' naskiĝis por ni!
Krist' naskiĝis por ni!

...

Joseph Mohr,
Weihnachtslied

1. Stille Nacht, heilige Nacht!
Alles schläft, einsam wacht
nur das traute, hochheilige Paar.
Holder Knabe im lockigen Haar,
schlaf in himmlischer Ruh,
schlaf in himmlischer Ruh!

2. Stille Nacht, heilige Nacht!
Hirten erst kundgemacht.
Durch der Engel Halleluja
tönt es laut von fern und nah:
Christ, der Retter ist da,
Christ, der Retter ist da!

3. Stille Nacht, heilige Nacht!
Gottes Sohn, o wie lacht
Lieb' aus deinem göttlichen
Mund,
da schlägt uns die rettende
Stund',
Christ, in deiner Geburt!
Christ, in deiner Geburt!

...

Traduko de la Germana poemo “Weihnachtslied” de JOSEPH MOHR (*1792 – †1848) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).

Arg-136-271 (2004-01-25 15:29:33)

La tradukinto, Joachim Gies-
sner, estis ĝis 2002 la estro de
Germana Fervojista Esperanto-
Asocio. Li tradukis multajn
kantojn en la Internacian
Lingvon. Kelkaj troviĝas en al-
dono al la ttt-pagharo de GEA
[http://www.esperanto.de/
kantoj/index-giessner.
html](http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html) kaj ankaŭ en la kantlibro
“Mia kantaro” de Josef Schif-
fer, Wilstorfstr. 58, D-78050
Villingen-Schwenningen, tel.
+49-(0)7721-508891, retpoŝto:
Josef.Schiffer@esperanto.de.

Traduko de la Germana poe-
mo “Weihnachtslied” de JOSEPH
MOHR (*1792 – †1848) en Espe-
ranton de N. N. 04.

Arg-136-270 (2012-07-26
15:23:29)

Tiu ĉi traduko de la konata
germanalingva kristnaska kanto
konsistas nur el la unua, sesa
kaj dua strofoj (en tiu ĉi vico)
de la origina sesstrofa teksto
de la kanto. Vidu en [http:
//www.stillenacht.info/de/
stillenacht/d_noten.htm](http://www.stillenacht.info/de/stillenacht/d_noten.htm).
Estas la tri strofoj, kiuj estas
konataj kaj kutime kantataj. La
Esperantigo de ĉiuj ses strofoj
troviĝas en tiu ĉi poem-kolekto
Argiop.bl0rg.net sub la
poem-titolo “Stille Nacht”.

Verkinto de tiu ĉi Germana poe-
mo estas JOSEPH MOHR (*1792 –
†1848), publikigita 1818.

Arg-136-269 (2004-01-25 14:58:16)

Diese Fassung des bekannten
deutschen Weihnachtsliedes ent-
spricht dem in deutschsprachigen
evangelischen Gesangbüchern
gewöhnlich abgedruckten Text
der ersten, sechsten und zweiten
Strophe der ursprünglich sechsstro-
phigen Urfassung. Siehe [http:
//www.stillenacht.info/de/
stillenacht/d_noten.htm](http://www.stillenacht.info/de/stillenacht/d_noten.htm)